Iun tagon li ricevis revelaciojn de la ARKIANĜELO GABRIELO en la Araba lingvo kaj li ekpredikis la unuecon de Dio. Komence li havis malmulte da adeptoj, sed tiu religio, kiu rekomendis la interhelpon, sukcesis pli kaj pli ĉe la homoj de malaltaj sociaj klasoj. Pro tio li kaj liaj adeptoj la ISLAMANOJ (Islamo signifas, en la Araba lingvo, submetiĝon je la Dia volo, kaj devenas el radiko, kiu signifas pacon) estis terure persekutataj kaj minacataj kaj devis fuĝi al la urbo JATRIB, kie li havis eminentajn partianojn kaj amikojn. Tiu urbo poste alinomiĝis kaj fariĝis MEDINO (t.e. Arabalingve urbo de la profeto). El tiu elmigrado ekas la Islama kalendaro luna nomata Heĝiron. Ĝi okazis en 622 p.k. kaj la vorto HEĜIRO, Arabe, havas ĝuste la sencon de elmigrado. Tiu kalendaro estas ankoraŭ uzata en la Islama mondo kiel religia kalendaro. Mahometo organizis la vivmanieron en Medino laŭ la priskriboj de la Korano (Araba-lingve, Koran signifas recitado-n, Mahometo recitis ja la revelacion Dian).

*Malheureusement cette situation nouvelle provoqua une crise dans l'ancienne société des bédouins. A l'époque de la grande pauvreté pour tous, la solidarité régnait; au contraire avec la prospérité, les riches se mirent à avoir le cœur dur et à devenir impitoyables à l'égard des déshérités, en outre l'ancienne religion polythéiste liée à l'ordre social ancien perdit du prestige. On était cependant de plus en plus au courant au sujet des religions juive et chrétienne, mais elles n'avaient qu'un faible succès car les Arabes étaient trop fiers pour accepter facilement des religions de peuples étrangers à leur ethnie. Cela d'autant plus que ces étrangers utilisaient dans leurs rites des langues étrangères, et pour les Arabes privés d'état, leur propre langue était "quelque chose comme leur patrie bien aimée".*

*C'est à cette époque que naquit le prophète Mahomet (environ 570 de notre ère). Il devint orphelin très jeune et fut éduqué par un des ses oncles Il était très pauvre quoique de bonne famille et membre du clan des koraïchites (c'est à dire les commerçants les plus appréciés et de plus haut rang à La Mecque). Alors qu'il était très jeune il se maria avec une veuve très aisée qui s'appelait Hadidja, et il manifesta une remarquable capacité pour accroître ses biens. En raison de son esprit avisé et de son intelligence, il devint un des commerçants les plus considérés de La Mecque. Mais cette vie ne le satisfaisait pas et il se passionnait pour les choses de la religion.*

*Un jour il reçut des révélations de l'Archange Gabriel en arabe et il se mit à prêcher l'unité de Dieu. Au début il eut peu d'adeptes, mais cette religion qui recommandait l'entraide se mit à avoir de plus en plus de succès chez les personnes de basses classes sociales. Pour cette raisons lui et ses adeptes les islamistes (musulmans) - Islam signifie en arabe, soumission à la volonté divine, et vient d'une racine qui signifie paix - étaient terriblement persécutés et menacés et durent s'enfuir à la ville de Yathrib où il avait des partisans et amis bien placés. Cette ville, par la suite, changea de nom et devint Médine (c'est à dire en arabe la ville du prophète). C'est à partir de cette émigration que commence le calendrier musulman lunaire appelé Hégire. Cette fuite eut lieu en 622 de notre ère et en arabe le mot hégire a justement le sens d'émigration.*

*Ce calendrier est encore utilisé par le monde musulman comme calendrier religieux.*

*Mahomet organisa la vie à Médine d'après les prescriptions du Coran (en arabe, Coran veut dire récitation; Mahomet récitait la révélation divine).*



Baldaŭ komencis militoj kontraŭ La Meko, ĉar la Mekanoj ne volis toleri la Islaman minacon. Fine Islamo venkis kaj Mahometo eniris kiel venkanto en La Mekon. Li samtempe sukcesis unuigi ĉiujn tribojn de Arabujo sub la verda flago de la nova religio. Li nelonge poste mortis en la jaro 11 a de Heĝiro. Li unuigis ne nur politike sed ankaŭ lingve la Arabojn, ĉar la lingvo de la Korano estis artefarita lingvo, sintezo de ĉiuj Arabaj dialektoj kaj pro tio ebligis bonan komprenon en ĉiuj partoj de Arabujo. Ĝi fariĝis la komuna lingvo literatura.

Post la forpaso de Mahometo, la nove vekita Arabujo estis endanĝerigita denove disfali inter la batalemaj triboj. La tuja posteculo de Mahometo kiel ŝtatestro, ABU BAKRO, estis nomita KALIFO (t.e. posteculo de la profeto en Araba lingvo). Li bone komprenis la minacon kaj decidis militi ekstere de Arabujo por allogi la tribanojn per rabaĵoj kaj samtempe vastigi la teritorion de Islamo. Oni ankaŭ aldonu, ke la tiama kreskado de la loĝantaro en la araba duoninsulo kaj ties militema karaktero, krome kunigita kun la forto de la Islama fido, ebligis imperian konkeradon.

Ekde 634 la Araboj konkeris PALESTINON kaj SIRION. Poste, ĉiam venkante, ili iris ĝis MEZOPOTAMIO kaj eĉ ARMENUJO. Okcidente en 639 ili malvenkigis la Bizancanojn en EGIPTUJO. Ĉirkaŭ la sama tempo ili invadis, Oriente, Persujon, kiu en 645 estis finkonkerita de ili. La Arabaj generaloj en la VIII a jarcento atingis ĈINUJON kaj BARATON (HINDUJON). En la dua duono de la VIIa jarcento la Islamanoj konkeris Magrebon kun multe da peno, en 711 ili eniris HISPANUJON venkis la VIZIGOTOJN, tiamaj mastroj de la Ibera duoninsulo, kaj eĉ trairis la sudan parton de FRANCUJO, kie ili estis haltigitaj ĉe la fama batalo de POITIERS (732) fare de la militestro de la FRANKOJ, KAROLO MARTELO.

Tiu vastega konkerado, almenaŭ komence, estis ebla pro la malfortiĝo de la Bizancaj kaj Persaj imperioj, ŝuldata je la senĉesaj militoj de ambaŭ imperioj, unu kontraŭ la alia. Ankaŭ la praloĝantoj de Egiptujo, Sirio, Palestino estis subpremataj religie kaj finance de la Bizancanoj. Ili neniel intencis batali por savi la malamatajn fremdajn mastrojn.

*Bientôt commencèrent des guerres contre La Mecque, car les Mecquois ne voulaient pas tolérer la menace musulmane. A la fin l'Islam remporta la victoire et Mahomet entra comme vainqueur à La Mecque. En même temps, il réussit à unir toutes les tribus d'Arabie sous l'étendard vert de la nouvelle religion. Il mourut peu après en l'an 11 de l'Hégire. Il avait unifié les Arabes non seulement du point de vue politique mais également du point de vue linguistique, en effet la langue du Coran était une langue artificielle, synthèse de tous les dialectes arabes et pour cette raison elle rendit possible une bonne compréhension dans toutes les parties de l'Arabie. Elle devint la langue littéraire commune.*

*Après la mort de Mahomet, l'Arabie nouvellement éveillée était menacée de s'effondrer de nouveau entre les tribus turbulentes. Le successeur immédiat de Mahomet, en tant que chef d'état, Abou Bakr, fut nommé khalife (c'est à dire successeur du prophète en arabe). Il comprit le danger et décida de faire la guerre à l'extérieur de l'Arabie pour allécher les tribus par des pillages et en même temps étendre le territoire de l'Islam. On doit également ajouter, que la croissance, alors, de la population de la péninsule arabe et son caractère guerrier, associée en outre à la force de la foi musulmane rendit possible une conquête impériale.*

*A partir de 634 les Arabes conquièrent la Palestine et la Syrie. Par la suite, toujours vainqueurs, ils allèrent jusqu'en Mésopotamie et même en Arménie. En Occident en 639 ils défirent les Byzantins en Egypte. A peu près à la même époque ils envahirent en Orient la Perse qui fut complètement conquise par eux en 645. Les généraux arabes au VIII<sup>ème</sup> siècle atteignirent la Chine et l'Inde. Dans la seconde moitié du VII<sup>ème</sup> siècle les musulmans conquièrent le Maghreb avec beaucoup de peine, en 711 ils entrèrent en Espagne vainquirent les Wisigoths, alors maîtres de la péninsule ibérique, et même traversèrent la partie méridionale de la France, où ils furent arrêtés lors de la célèbre bataille de Poitiers (732) par le Chef militaire des Francs, Charles Martel.*

*Cette immense conquête fut possible, tout au moins au début, en raison de l'affaiblissement des Empires Byzantin et Perse, dû aux guerres incessantes des deux empires l'un contre l'autre. Il faut dire également que les populations indigènes d'Egypte, Syrie et Palestine étaient opprimées religieusement et financièrement par les Byzantins. En aucune manière, ils n'avaient envie de se battre pour sauver les maîtres étrangers détestés.*



Male en Norda Afriko, la Berberoj estis bonegaj militistoj kaj la konkerado tie daŭris, kun antaŭen - kaj malantaŭen-irado, proksimume duonan jarcenton.

La Guberniestro de Sirio, MUAWIJA, el la FAMILIO de la OMAJADOJ fariĝis Kalifo en 660 p.k.. La Centro de la imperio tiam transiris al Sirio kaj ties ĉefa urbo, DAMASKO, fariĝis la regurbo de la Araba imperio. Damasko havis tiutempe la famon esti la plej malnova urbo en la mondo.

Komencis la unua epoko klasika de la Araba Islama civilizacio. La Siroj parolis lingvon tre similan al tiu de la Araboj kaj ili rapide alprenis la Araban lingvon. Same pro la fakto, ke la Kristanoj pagis impostojn pliajn, kiujn la Islamanoj ne pagis, sen perforto multaj homoj konvertiĝis je Islamo. La homoj de proksima Oriento (Egiptujo, Sirio) havis tre malnovajn kulturojn. Post konvertiĝo kaj Arabiĝo, ili kunkreis novan civilizacion sur Islama bazo.

La riĉaĵoj de la imperio ekis alflui en la Centro de la Islama mondo kaj la Kalifoj alkiutimiĝis vivi en lukso. En la havenojn alvenis varoj el la tuta mondo: eburo el Afriko, silko el Ĉinujo, spicoj el Hindujo potaĵoj kaj oraj arĝentaj juvenoj el Persujo. Tiam la regnestroj konstruigis belegajn palacojn kaj moskeojn (Islamajn preĝejojn). La Beduenoj lernis de iliaj regatoj: ĝentilecon, sciencojn, artojn kaj teologion. Kiam en Okcidento regis ĥaoso post la barbaraj invadoj; en Oriento ekfloris brile la Islama civilizacio en imperio kies unueco estis sekurigita per unueco de la lingvo, nome la Araba lingvo estis dekretita sola administracia lingvo ĉirkaŭ la jaro 700 a.

Tiu lingvo simbolo de la Arabaj kulturo kaj civilizacio, jam fleksebla kaj ankaŭ esprimoplena, riĉiĝis per alpreno de vortoj de ĉiuj najbaraj altaj civilizacioj. Kompense ĝi transdonis al la eŭropaj lingvoj tiujn vortojn, kiujn ili malhavis kaj tiuj ĉi vortoj fariĝis internaciaj, sekve ankaŭ esperantaj, ekzemple: Sofo, sukero, taso, kafo, mokao, arako, alkovo, magazeno, oranĝo, abrikoto. Ni eĉ ŝuldas al ĝi matematikajn kaj astronomiajn vortojn kiel alĝebro, Aldebarano, Altairo - nomo de steloj - zenito, nadiro. IBN SEID (forpasinta en 1065) redaktis vortaron, kiu jam nombris 20 volumojn.

Inter Arabaj regatoj okazis daŭre kvereloj pro religiaj kaj dinastiaj kialoj.

*Par contre, en Afrique du Nord, les Berbères étaient d'excellents soldats et la conquête y dura, avec toutes sortes d'aléas, environ un demi siècle.*

*Le Gouverneur de Syrie, Mouawiya, de la famille des Ommeyyades devint Khalife en 660. Le centre de l'empire passa alors en Syrie et sa ville principale, Damas, devint la capitale de l'empire arabe. A cette époque Damas avait la réputation d'être la plus vieille ville du monde.*

*La première époque classique de la civilisation arabo-islamique commença. Les Syriens parlaient une langue très semblable à celle des Arabes et ils adoptèrent rapidement l'idiome de leurs conquérants. De même en raison du fait que les Chrétiens payaient des impôts supplémentaires, que les musulmans ne payaient pas, beaucoup de personnes se convertirent sans violence à l'Islam. Les peuples du Proche Orient (Égypte, Syrie) possédaient de très anciennes cultures. Après la conversion et l'arabisation, ils contribuèrent à créer une nouvelle civilisation sur une base islamique.*

*Les richesses de l'empire commencèrent à affluer au centre du monde musulman et les Khalifes s'habituaient à vivre dans le luxe. Dans les ports arrivaient des marchandises du monde entier: ivoire d'Afrique, soie de Chine, épices des Indes, des poteries ainsi que des bijoux d'or et d'argent de Perse. Alors les souverains firent construire des palais et des mosquées superbes. Les Bédouins apprirent de leurs sujets: la politesse, les sciences, les arts et la théologie. Alors que le Chaos régnait en Occident après les invasions barbares; en Orient la civilisation musulmane commençait à s'épanouir avec splendeur dans un empire dont l'unité était assurée par l'unité de la langue, en effet on avait décrété l'arabe seule langue administrative vers 700.*

*Cette langue, symbole de la culture et de la civilisation arabe, déjà souple et expressive, s'enrichit par l'adoption de mots de toutes les hautes civilisations voisines. En compensation elle transmet aux langues européennes ces mots qui leur manquaient, et ces vocables devinrent internationaux, par conséquent également partie du vocabulaire de la langue espéranto, par exemple: sofa, sucre, tasse, café, moka, arac, alcôve, magasin, orange, abricot. Nous leur devons même du vocabulaire en mathématique et astronomie, ainsi: algèbre, des noms d'étoiles - Aldebaran, Altaïr -, zénith, nadir. Ibn Seïd (décédé en 1065) rédigea un dictionnaire, qui comptait déjà vingt volumes*

*Entre dirigeants arabes se produisaient constamment des querelles pour des motifs religieux et dynastiques.*



Ekde la komenco ekestis malpaco inter la partianoj de ALI, bofilo de la profeto, kiu, laŭ ili, devus fariĝi Kalifo kaj ties kontraŭuloj, kiuj opiniis, ke la Kalifo estu la plej saĝa kaj kapabla viro. Post intercivitana milito Ali malvenkis cirkaŭ la jaro 660 kaj estis mortigita. Tamen li ankoraŭ havas adeptojn religiajn, kiuj glorigas lin. Ili estas famkonataj nuntempe, car ili estas la **ŜIJAISTOJ**, kaj oni bone scias, ke **AJATOLO HOMEJNI** estis Ŝijaisto.

La Kalifoj de Damasko iom post iom dronis en lukso, moleco kaj diboĉo. Tiam alia branĉo de la dinastio, la **ABASIDOJ**, puĉis cirkaŭ 750 kontraŭ ili. Unu el la lastaj familianoj de la Omajadoj fuĝis al Hispanujo, nomata de la Araboj, **ANDALUZIO**. Li proklamis sin mem Kalifo kaj liaj posteuloj regis, dum pluraj jarcentoj Andaluzion, en sia regurbo **KORDOVO**.

La Abasidoj, kiuj estis parte de Persa deveno setlis en Bagdado en 762; tiam Bagdado estis urbeto ĉerande de Persujo. Post kelkaj jardekoj ĝi fariĝis urbego de pli ol unu miliono da loĝantoj. La Persoj, kiuj estis multnombraj ĉirkaŭ la Kalifo, kiel administrantoj kaj konsilantoj, provis Persigi la imperion rilate la morojn, kulturon, artojn, vivmanieron kaj uzante la Araban lingvon. Ili sufiĉe bone sukcesis kaj altrudis, sub Araba vestaĵo, la Persan kulturon. La Persa kulturo, antikva je pluraj jarmiloj, rilatante kun Bizanco, Ĉinujo, Barato kaj la Centra Azio estis la plej brila en la tiama mondo. En Bagdado, la Araboj aŭ Arabigitaj Persoj havis la plej gloran tempon de sia civilizacio. Ili lernis sciencojn el Ĉinujo, Hindujo (ili alprenis de la Hindoj la t.n. Arabajn ciferojn), instruigis pri la filozofio de la antikvaj **GREKOJ** kaj perfektigis ties akiraĵojn en alkemio (praa kemio), astronomio, matematiko kaj precipe kuracarto. Ankaŭ la arkitekturo estis rimarkinda, la Araboj konstruigis belajn palacojn kaj moskeojn. Oni nun ekpensas, ke la ogiva formo de la moskeaj vitralofenestroj kaj arkitekturo estis poste alprenita de la Kristanoj por la katedraloj kaj tiel naskis la gotikajn arkitekturon kaj arton.

La Araba Islama civilizacio estis ponto inter la antikvaj civilizacioj precipe **HELENA**, **LATINA** kaj la moderna civilizacio de Okcidento.

*Dès le début des dissensions se firent jour entre les partisans d'Ali, gendre du prophète qui d'après eux aurait dû être Khalife et leurs adversaires qui étaient d'avis que le Khalife devait être l'homme le plus sage et le plus capable. Après une guerre civile Ali fut vaincu, vers 660 et fut assassiné. Cependant il a encore des adeptes qui le célèbrent. Ils sont réputés de nos jours, car ils sont les Chiites et l'on sait bien que l'ayatollah Khomeyni était un Chiite.*

*Les khalifes de Damas sombrèrent peu à peu dans le luxe, la mollesse et la débauche. C'est alors qu'une autre branche de la dynastie, les Abassides, firent un coup d'état contre eux vers 750. Un des derniers membres de la famille des Ommeyyades s'enfuit en Espagne, que les Arabes appelaient Andalousie. Il se proclama lui même khalife et ses successeurs gouvernèrent l'Andalousie, pendant plusieurs siècles, dans leur capitale de Cordoue.*

*Les Abassides, qui étaient en partie d'origine perse, s'installèrent à Bagdad en 762; à cette époque Bagdad était une petite ville sise aux confins de la Perse. Après quelques décennies, elle devint une métropole de plus d'un million d'habitants. Les Perses qui étaient nombreux autour du khalife, en tant qu'administrateurs et que conseillers, tentèrent de "persiser" l'empire du point de vue des moeurs, de la culture, des arts, de la façon de vivre tout en usant la langue arabe. Ils réussirent assez bien et imposèrent, sous un revêtement arabe, la culture perse. Cette culture perse, vieille de plusieurs millénaires, ayant des relations avec Byzance, la Chine, l'Inde et l'Asie centrale était la plus brillante du monde d'alors. A Bagdad, les Arabes ou Perses arabisés connurent l'époque la plus glorieuse de leur civilisation. Ils apprirent les sciences de la Chine, de l'Inde (ils empruntèrent aux Indiens les chiffres appelés chiffres arabes), ils s'instruisirent dans la philosophie des anciens Grecs et perfectionnèrent leurs acquisitions en alchimie (ancêtre de la chimie), astronomie, mathématiques et surtout médecine. Leur architecture était également remarquable, Les Arabes construisirent des palais et des mosquées splendides. De nos jours on se met à penser que la forme ogivale des fenêtres de mosquée et de l'ensemble de son architecture, fut ensuite reprise par les Chrétiens pour les Cathédrales et que cela fut à l'origine de l'architecture et de l'art gothiques.*

*La civilisation arabo-islamique fut un pont entre les civilisations antiques, surtout grecque et latine et la civilisation moderne de l'Occident.*



La ora epoko de la Araba civilizacio okazis dum la tempo de Kalifo HARUN AL RASID, kiu regis en Bagdado ĉirkaŭ la jaro 800 de la Krista erao. Ankoraŭ nuntempe la Araboj parolas nostalgie pri tiu tempo. Tiu Kalifo estis tiu, kiun ni konas en Okcidento danke al la traduko de la libro "Fabeloj de la mil unu noktoj".

Sed baldaŭ ekis dekadenco politika, almenaŭ por la imperio. Jam ekzistis sendependa Kalifejo en Andaluzio de post ĉirkaŭ 750, pro malfortaj registroj en Bagdado, aperis fine de la X a jarcento sendependa Kalifejo en Egiptujo, kaj Persujo farigis denove regno sendependa. Tamen ankoraŭ prosperis kaj brilis la Araba civilizacio; precipe en Andaluzio dum la X a kristana jarcento.

Kiam la cetera parto de Eŭropo vivis mizere kaj anarkie, duono miliono da civitanoj de Kordovo (regurbo de Andaluzio) ĝuis lumigitajn stratojn, povis viziti 70 bibliotekojn kaj 800 lernejojn. La ĉefa urbo de la Kalifejo estis ankaŭ kultura centro, oni instruis altnivele tie: filozofion, medicinon, matematikon kaj astronomion...

En Egiptujo, la Kalifejo de la FATIMIDOJ havis brilajn vivoformon kaj civilizacion. Ĉefe la artoj ekfloris rimarkinde ĝis la XV a Krista jarcento; oni konstruigis precipe la faman moskeon EL AZHAR en KAIRO famkonatan tutamonde, sed ankaŭ la moskeon de KAJT BEJ, la pordegon de BAB AL FOTUH. kaj multajn aliajn belegajn monumentojn. Estas bedaŭrinde, ke la Okcidentaj turistoj niatempaj, kiam ili vizitas Egiptujon, estas blindigitaj per la brilego de la antikva civilizacio de tiu lando, kaj pro manko de scivolo pretervidas la belaĵojn de la mezepoka Islama civilizacio en la NILOLANDO.

Sed alvenis ankaŭ la dekadenco kultura ĝis la deka jarcento de nia erao (kvara jarcento de Heĝiro), la Islamanoj interpretis de tempo al tempo la instruadon de la Korano kaj tiel aktualigis ĝin. Bedaŭrinde post la forpaso de tiu tempo, tia interpretado (IJTIHAD) ne plu estis farita kaj la Araba Islama mondo ĉesis evolui kaj ŝtoniĝis.

Pliaj katastrofoj estis la krucmilitoj, la invadoj de la MONGOLOJ.

En 1258, Bagdado estis sieĝita, kaptita kaj detruita, ĝi ne vere releviĝis poste.

*L'âge d'or de la civilisation arabe eut lieu à l'époque du khalife Haroun al Rachid, qui régnait à Bagdad autour de l'an 800 de notre ère. Encore aujourd'hui les Arabes parlent avec nostalgie de cette époque. Ce khalife était celui que nous connaissons en Occident grâce à la traduction du livre : "Contes des mille et une nuits".*

*Mais bientôt commença la décadence politique, du moins pour l'empire. Déjà un khalifat indépendant existait en Andalousie depuis environ l'an 750, à cause de dirigeants faibles à Bagdad, un khalifat indépendant apparut à la fin du X<sup>ème</sup> siècle en Egypte, et la Perse redevint un état indépendant.*

*Cependant la civilisation arabe prospérait et brillait encore; surtout en Andalousie au X<sup>ème</sup> siècle de l'ère Chrétienne.*

*Quand le reste de l'Europe vivait dans la misère et l'anarchie, un demi million de citoyens de Cordoue avaient à leur disposition des rues éclairées, pouvaient visiter 70 bibliothèques et 800 écoles. La ville principale du khalifat était aussi un centre culturel, on y enseignait à un haut niveau : la philosophie, la médecine, les mathématiques et l'astronomie...*

*En Egypte, le khalifat des Fatimides avait une forme de vie et une civilisation brillante. Tout particulièrement les arts s'y épanouirent remarquablement jusqu'au XV<sup>ème</sup> siècle chrétien; on construisit surtout la fameuse mosquée El Azhar au Caire, célèbre dans le monde entier, mais également la mosquée de Kait Bey, la porte de Bab al Fotouh et beaucoup d'autres monuments splendides.*

*Il est regrettable que les touristes occidentaux de notre temps, quand ils visitent l'Egypte, soient aveuglés par l'éclat de la civilisation antique de ce pays, et par manque de curiosité passent à côté des choses magnifiques de la civilisation islamique médiévale au pays du Nil.*

*Mais la décadence culturelle se produisit également. Jusqu'au X<sup>ème</sup> siècle de notre ère (4<sup>ème</sup> siècle de l'Hégire), les musulmans interprétaient de temps à autre l'enseignement du Coran et de cette façon le rendaient actuel! Malheureusement après ce laps de temps, une telle interprétation (Ijtihad) ne fut plus faite et le monde arabo-islamique cessa d'évoluer et se pétrifia.*

*Comme autres catastrophes, il y eut les croisades et les invasions des Mongols.*

*En 1258, Bagdad fut assiégée, prise et détruite, elle ne se releva pas vraiment par la suite.*





Kaj en la XVI a jarcento la superregado de TURKOJ sur preskaŭ la tuta Araba mondo estis granda malbonŝanco. Nome la Turkoj estis tre konservativemaj kaj malpermesis ĉiu n progreson.

En la XIX a jarcento kaj komence de la XX a jarcento okazis la Eŭropa koloniigo. Tio estis terura ŝoko por la Araboj, des pli ke ili ekkonsciis pri sia ega malmoderneco kompare kun la EŬROPEANOJ.

Gis nun ili malsukcesis reatingi Okcidenton, kaj la malfacilaĵoj ŝuldataj antaŭ ĉio al tro forta demografio favoras la ekstremismajn Islamanojn. Neniu povas antaŭvidi la estonton de la Araboj sed nuntempe ĝi ne aspektas rozkolora...

Tamen ne ĉie estas mallumo, en SAŬDA ARABUJO, dank'al la riĉaĵoj de la petrolo, la tieaj Araboj vivas bonege, havas unuarangan sistemon pri socia protektado, kaj starigas bonegajn lernejojn kaj universitatojn.

Ĉu nova Araba civilizacio startos en tiu regiono de la Araba mondo ?


*Et au XVI ème siècle la domination des Turcs sur presque tout le monde arabe fut une grande malchance. En effet les Turcs étaient très conservateurs et interdirent tout progrès. Au XIX ème siècle et au début de XX ème siècle se produisit la colonisation européenne. Ce fut un choc terrible pour les Arabes, d'autant plus qu'ils prirent conscience de leur énorme retard sur les Européens.*

*Jusqu'à présent ils ont échoué à rattraper l'Occident, et les difficultés, dues avant tout à une trop forte démographie, favorisent les islamistes extrémistes. Personne ne peut prévoir l'avenir des Arabes, mais à l'heure actuelle, il ne semble pas devoir être brillant...*

*Mais les ténèbres ne s'étendent pas partout, en Arabie Séoudite, grâce aux richesses du pétrole, les Arabes locaux vivent très bien, ont un système de protection sociale de premier plan et créent d'excellentes écoles et universités.*

*Est ce qu'une nouvelle civilisation arabe démarrera dans cette région du monde arabe ?*

JOHANO MARKO



JOHANO MARKO

Porte-Bab-el-Fotouh



INTERLANDa alvoko al ĉiuj legantoj.

Kiam, en 1988, fondiĝis la firmao INTERLAND, estis grandparte por kunigi la konceptojn realismo kaj pragmatismo kun tiu de esperantismo. Bilanco post kvar jaroj: nek la esperantistoj nek la realistoj tute aprobas la menciitan entreprenon. Ĉiel ĝi malmultege ĉagreniĝas pro ricevitaj malbenoj, kaj kontentigas sin per pluekzistado kaj per siaj perspektivoj pri baldaŭ prosperiĝo, kiuj devus malinstigi la estintajn kaj nunajn kontraŭINTERLANDulojn, sojle de 1993...

Sed, nun, INTERLAND estas trovinta rimedon por iel reakordiĝi kun la esperantismo, okaze de ĉi-jarfina evento. Estas rezervita tasko por la esperantistoj decidi, ĉu ili kaptos aŭ ne la tiel ofertatan oportunajon.

Resume, la direktoro kaj fondinto de la firmao INTERLAND, Alexandre ROUSSET (aleksandr' ruse') konceptis projekton de iu foiro kiu, premiita de konkurso pri tiaj iniciatoj, ja povos efektiviĝi postkeltempe kaj minimumkoste. Tiu evento, baptita MIGR'EXPO, temas pri la internaciaj movadoj de laboristoj, kaj kromtitoliĝis "la unua foiro por instigi kaj faciligi la dungigon de francoj eksterlande". Tiu migr-ekspozicio enprogramiĝis en la Ekspozician Parkon Paris-Nord-Villepinte, ĉe la datoj 11-a ĝis 14-a de decembro 1992.

Rezervi lokon por Esperanto en MIGR'EXPO estas normala, pro ke tiu lingvo agas ilo por facila komuniko de ĉiuj elmigrintoj, al kiuj ĝi kapablas doni senpenan instaligon en la fremdan urbon, kien ilia kariero kondukis ilin: danke al la tiea esperantista grupo, kiu malfermos por ili siajn pordojn kaj helpos ilin senrasisme.

Tial, INTERLAND proponas al Esperanto senpagan surfacon da budo (tiom vastan, kiom deziriĝos), kompanse kun deĵorado je kontrolo de la foiro (dum ĉirkaŭ 6 horoj popersone, la tagon elektitan de ĉiu). La volontuloj por MIGR'EXPO (inter 92/12/11 kaj la Zamenhof-tago, inkluzive) bonvolu prezenti sin al Alexandre ROUSSET

(25, bulvarde Jules-Sandeau, 75116 Paris; telefone: 1/45 03 10 03 aŭ 90 25 43 77; fakse: 1/43 26 38 61 aŭ 90 25 85 19).

Tiu oferto ĉi devos esti akceptita, aŭ rifuzita, antaŭ venonta oktobro (limdato por proprigi la budojn). Po ses deĵoradoj, principe necesiĝos dudek-kvar volontuloj por ke la propono oficialiĝu.

Dankon al ĉiuj, kaj ĝis baldaŭ!

Alexandre ROUSSET.

Un appel d'INTERLAND à tous les lecteurs.

Quand, en 1988, a été fondée la société INTERLAND, c'était en grande partie pour concilier les notions de réalisme et pragmatisme avec celle d'espérantisme. Bilan, 4 ans plus tard: ni les espérantistes, ni les réalistes n'approuvent totalement ladite entreprise. De toute façon, celle-ci est assez peu sensible aux imprécations et se contente d'exister toujours, avec des perspectives d'expansion prochaine qui devraient décourager ses détracteurs passés et présents, à la veille de 1993...

Mais, dans l'immédiat, INTERLAND a trouvé le moyen de se réconcilier un peu avec l'espérantisme, lors d'une manifestation qui aura lieu à la fin de cette année. Il n'appartient qu'aux espérantistes de décider s'ils saisiront ou non l'opportunité qui leur est ainsi offerte.

En résumé, Alexandre ROUSSET, le directeur et fondateur d'INTERLAND, a conçu un projet de salon qui, primé lors d'un concours de semblables projets, va pouvoir se réaliser bientôt et au moindre coût. Cette manifestation, baptisée MIGR'EXPO, a pour thème les mouvements internationaux de travailleurs et est sous-titrée "le 1<sup>er</sup> salon pour encourager et faciliter l'emploi des Français à l'étranger". MIGR'EXPO est programmé au Parc des Expositions de Paris-Nord-Villepinte, du 11 au 14 décembre 1992.

La place de l'espéranto est évidente à MIGR'EXPO, en sa qualité d'outil de communication facile pour tous les expatriés, à qui il peut apporter une intégration aisée dans la ville étrangère où leur carrière les a menés: grâce au groupe espérantiste local, qui leur ouvrira ses portes et les aidera sans discrimination.

INTERLAND offre donc à l'espéranto une surface gratuite de stand aussi vaste que souhaité, en échange d'un service de surveillance du salon (d'environ 6 heures par personne, le jour choisi par chacun). Les volontaires pour MIGR'EXPO (du 11/12/92 au jour de Zamenhof inclus) sont priés de se faire connaître auprès d'Alexandre ROUSSET (25, bd Jules-Sandeau, 75116 Paris; tél.: 1/45 03 10 03 ou 90 25 43 77; fax: 1/43 26 38 61 ou 90 25 85 19).

La présente offre doit être acceptée ou refusée avant octobre prochain (date-limite pour la répartition des stands). A 6 h par personne, il faudra en principe 24 volontaires pour que l'offre soit validée.

Merci à tous et à bientôt!

Alexandre ROUSSET.



## Averto

### PRI INTERLANDa ALVOKO

Mi ne scias se, legante sian revuon en la Ĉielo, Calixte CAVALIE estus konsentinta por aperigi la ROUSSET-an artikolon.

Mi dubas pri tio...

Ni aperigas tiun-ĉi por montri ke ni estas nenies kontraŭuloj, male ni penas konstrui pozitivan kaj modernan revuon, nek partian, ni polemikan.

(La du desegnaĵoj pĝ 14 kaj pĝ 15 estas nur bonkoraj serĉoj kaj neniamaniere malbona intenco).

Tiu-ĉi artikolo estas, tio pri kion ni ne plu akceptos, la perfekta ekzemplo...

Mi klarigas : ordona tono (esperantistoj ne estas ankoraŭ ŝafaro...), kontraŭverajoj (ne estas vere diri ke esperanto kapablas doni senpenan instaligo al fremduloj).

Sed ni malfermas al ĉiuj la venontan revuon, kiu enhavos "Leteraro de la legantoj". Kaj ni, kompreneble, akceptos ĉiujn trafajn kritikojn celantajn plibonigi nian taskon.

Michel PETIT

## Avertissement

### SUR L'APPEL D'INTERLAND

Je ne sais pas si, en lisant sa revue dans le ciel, Calixte CAVALIE aurait accepté de faire paraître l'article d'Alexandre ROUSSET.

Je doute de cela...

Nous le faisons paraître pour montrer que nous ne sommes les détracteurs de personne, au contraire, nous prenons la peine de construire une revue positive et moderne, ni partielle, ni polémique. (Les deux dessins p 14 et p 15 ne sont que de cordiales plaisanteries et en aucune manière d'intention mauvaise).

Cet article est le parfait exemple de ce que nous n'accepterons plus...

J'explique : un ton impérieux (les espérantistes ne sont pas encore des moutons...), des contre-vérités (il n'est pas vrai de dire que l'espéranto peut apporter une intégration aisée pour les étrangers).

Mais nous ouvrons la prochaine revue à tous, elle aura "Un courrier des lecteurs". Et, naturellement nous accueillerons toutes les critiques pertinentes ayant pour objet d'améliorer notre tâche.

Michel PETIT

## Dankon al la redaktantoj

Sen la aktiva partoprenado de bonvolaj redaktantoj, tiu revuo estus mortinta.

Pro tio mi dankegas ilin.

Ŝirmitaj sub iliaj foje bizaraj pseŭdonimoj, ili estas fervoraj kaj agemaj esperantistoj, kiuj profunde amas esperanton kaj strebas disvolvi la uzadon de la lingvo per ilia ĉiutaga agado

Amikoj, ankoraŭ dankon !...

Michel PETIT

## Merci aux rédacteurs

Sans la participation active de rédacteurs volontaires, cette revue serait morte.

Pour cela je les en remercie de tout coeur. Cachés derrière leurs pseudonymes parfois bizarres, ils sont de fervents et actifs espérantistes qui aiment profondément l'espéranto et s'évertuent à développer la langue dans leur action de tous les jours.

Amis, encore merci !...

Michel PETIT

## Abonilo Bulletin d'abonnement

Familia nomo..... Persona nomo .....  
Nom Prénom

Adreso .....  
Adresse

Posta Kodo ..... Urbo .....  
Code postal Ville

Lando .....  
Pays

Abonas dum unu jaro la revuon ESPERANTO-95 je la prezo de 6,4 EKUOJ (aŭ 8 dolaroj) ene de la Eŭropa komunumo, aŭ 8 EKUOJ (aŭ 10 dolaroj) ekster la Eŭropa Komunumo. S'abonne pour un an à la revue ESPERANTO-95 au prix de 42,60 francs (France uniq<sup>ment</sup>).

Komencante de la ..... Via abono finigis  
A compter du Votre abonnement est terminé



## SOLVO DE LA LUDOJ

### SOLVO DE LA DESEGNAJO DE LA PAĜO 21

kajto : cerf volant  
 kalkanumo : talon (de chaussure)  
 kamiono : camion  
 kano : roseau  
 kapo : tête  
 karafo : carafe  
 kaskedo : casquette  
 kato : chat  
 kelnero : garçon de café  
 kirko : église  
 klapo : volet  
 kleriko : clerc - ecclésiastique

kolo : cou  
 kolbaso : saucisse  
 kolombo : pigeon  
 konvelo : muguet  
 korbo : panier/corbaille  
 korsaĝo : corsage  
 kulo : moustique  
 kurteno : rideau  
 koko : coq  
 kresto : crête  
 kanoto : canot

kampo : champ  
 kravato : cravate  
 kolumo : col (vêtement)  
 kuĵero : cuillère  
 kardo : chardon  
 koliero : collier  
 kastelo : château  
 kamelo : cheminée  
 kraĵono : crayon  
 kafejo : café (débit)  
 kanotoĉapelo : canotier

## SOLUTION DES JEUX

### SOLUTION DU DESSIN DE LA PAGE 21

### KRUCVORTENIGMOJ (PAĜON 20 )

	1	2	3	4	5	6	7	8	9
1	H	I	M	E	R	U	L	O	J
2	O	R	I	G	I	N	A	L	O
3	R	I	L	A	T	U		E	Ĉ
4	K	S	I		M	I	T	A	J
5	A		O	R	I	G	A	N	O
6	N	A	N	O		O	R	D	
7	D	R	U	Z	O		A	R	O
8	E	G	L	E	F	I	N	O	J
9	L	O		O	T	I	T		D
10	O	N	K	L	A		E	M	I
11	J	O	G	O		A	L	I	O

### MOTS CROISES FACILES (PAGE 19)

	1	2	3	4	5	6	7	8	9
1	A	D	M	I	R	A	N	T	A
2	N	E	O	L	O	G	I	S	M
3	A	F	R	O	D	I	T		A
4	L	I	T		O		O	I	S
5	I	L	I	A	D	O		A	L
6	Z	O		C	E	R	T	I	O
7	E	S	T	I	N	G	I		Ĝ
8	M		I	N	D	I	G	N	E
9	E	S	K		R	A	R	A	J
10	C	E	L	T	O		D	V	O
11	O	P	I	O		E	J	O	J

### LA 13-ERARA TEKSTO (PAĜON 19 )

### LE JEUX DES 13 FAUTES (PAGE 19 )

Kaj la gepatroj mire sin interrigardadis : la voĉo de ilia filino iĝis voĉo kiel la ceteraj. "Nu, ripetu," diris la patro kiel eble plej milde , mi malbone aŭdis". Sed la junulino ruĝiĝis kaj eĉ vorton ne diris.

Post la manĝo, la gepatroj kuniris al sia cambro kaj la patro ekparolis : "Sed se ŝi vere ne plu havas tiun strangan vocon, ni devos informi la familion. Kaj eble ni organizu intiman festeton, ne dirante kompreneble la kaŭzon de tiu ĝojesprimio. "Atendu ankoraŭ kelkajn tagojn". "Certe, ni atendu almenaŭ ok tagojn. Ni estus singardaj".

Jules SUPERVIELLE : "Junulino kun violona voĉo" El la franca traduko : Hervé GONIN  
 U.F.E., 1988 - LA INFANO EL LA ALTA MARO KAJ ALIAJ RAKONTOJ  
 Franca esperantisto, n-ro 394, 64 p.